# FASKO DA SUKCESOJ

De antikve ekzistas en Toledo la plej grava fabriko de armiloj en Hispanio. Kiam la faŝistoj kaptis la urbon, tuj ili reorganizis la laboron. Specialaj maŝinoj alvenis el Germanio. Ankaŭ venis germanaj teknikistoj. La produktokapablo estis tre mirige pligrandigita.

El tiu fabriko eliris ĉiutage pli ol duonmiliono da fusilaj kartoĉoj krom aliaj militaj produktaĵoj. Tiu fabriko provizis ĉefe la madridajn frontojn.

Sed, pasintan monaton, la respublika armeo decidis fini tiun situacion. Iun matenon, niaj kanonoj pafis, unue kiel avizo por ke la laboristoj povu forlasi la fabrikejon, k post duonhoro komencis bombardadi intense. La tuta ampleksa konstruaĵo estis detruata.

Grandegaj eksplodoj avertis pri malapero de la varoj tie deponitaj. La enloĝantoj de la urbo rapide forkuris k novaj trupoj alvenis por defendi la pozicion.

...Sed Toledo jam ne plu fabrikas municion!

◆ ◆ ◆

Fanfarone, per flugoj de fantazio, anoncis generalo Franko al ĵurnalistoj *sian* planon:

Per militŝipoj «España» k «Velasco» li blokados la nordajn havenojn. Samtempe la trupoj furioze atakos k prenos urbon Bilbao. La aviadilaro detruos ĉion. Rapide malaperos la respublika norda zono. La asturia tragedio finiĝos ankaŭ. Poste li atakos ĉiuflanken la registaran mediteranean zonon k la popola registaro, post kelkaj tagoj, restos preskaŭ enfermita. Ĝi povos nur fuĝi al Francio...

Sed la unua parto de tiu iluzia plano tute fiaskis. Krevis sapa vezikol

La nordaj trupoj rezistis laŭpove dum la unuaj tagoj, k nun ili jam efike kontraŭatakas.

Kaj la mara faŝista potenco bruege krevis. Tiu potenco sin apogis ĉefe sur la kirasŝipo «España» k la glora respublika aviadilaro subakvigis tiun kirasŝipon kiam ĝi atakis anglan komercoŝipon, apud haveno de Santander.

Estas la unua fojo en la mondo ke aeroplano plene venkis en batalo kontraŭ militŝipo k dronigas ĝin. Tio estas gravega milita fakto.

Ankaŭ estas, aŭ devus esti, graga detalo ke la faŝistaj militŝipoj ve atakis al angla ŝipo. Sed, ni ne dubas ke S-ro Eden enketos ankaŭ pri la afero... Kiu ne volas, tiu ne vidas!

Tamen, la vera grava fakto estas la malapero en la profundon de la maro, de la plej granda k valora militŝipo faŝista k ankaŭ la malapero de la iluzia plano...

◆ ◆ ◆

En provinco Jaen, ĉe la komenco de montaro Sierra Morena, ekzistas sanktejo nomata «Virgen de la Cabeza» (Virgulino de la Kapo). Ĝi estas treege forta, ŝtona konstruaĵo, kvazaŭ milita fortikaĵo.

Dum la unuaj tagoj de la ribelo, la



Sama instrumento povas esti nobla aŭ abomena; tio dependas de la celo trafenda. La popola brako fortike tenas la fusilon, kiu nun en Hispanio estas jam garantio de libero k rajto

civilgvardistoj de la provinco Jaen, sub komando de kapitano, sin rifuĝis tie kun siaj familioj k kelkaj kaptitoj.

Tion ili faris per trompo al respublikaj aŭtoritatoj, kiuj permesis tion por eviti malagrablaĵojn k cedante al promesoj de la kapitano. Kiam ili atingis la sanktejon, enmastigis la monarkian flagon k pafis al niaj milicanoj.

Niaj trupoj sieĝis ilin, sed ne atakis; estis espero pri kapitulaco k oni ne volis ataki konstruaĵon kie estis multaj virinoj k infanoj.

Naŭ monatojn daŭris la sieĝo. La ribelintoj ricevadis, per la fa: aeroplanoj, manĝaĵojn, armilo municion. Sed iom post iom la s cio malboniĝis por ili. La sieĝo madis la rifuĝintojn pli k pli. aeroplanoj malfacile povis plenur provizuman taskon.

Oni incitis diversfoje al ili pri pitulaco sed la perfiduloj ĉiam esp eksteran helpon.

Fine, delegitaro de Intern. Ruĝa Kruco petis al ili eliron d virinoj k infanoj, kiuj malsatis. Sc nobla propono estis malakceptat.

Konsekvence de tiu rifuzo r trupoj fine decidis solvi la afero atakis kuraĝe. Tuj aperis en fene: blanka flago.

Ducent kvindek civilgvardisto kvarcent civiluloj estas tie kaptita homece traktataj.

La faŝista fokuso de «La Vir de la Cabeza» jam feliĉe malepari

# ANONIMA HEROC

Ĉe sektoro «Universitata Urb (Madrido) iu lojala soldato, provi mita per mitralfusilo, saltis for el tranĉeo k sin trenante, iris tridek r trojn al malamika flanko. De tranĉeo, liaj kamaradoj tenis lin ŝnuro. Kiam li konsideris oport la momenton, pafis kontraŭ la faŝis Pluraj el ili ne havis tempon kon ciiĝi pri tiu subita atako.

Tiu soldato antaŭ nelonge elp al niaj vicoj. Ekde tiam, ĉe la m amikoj oni kredas lin mortinta, ĉa ŝanĝis siajn dokumentojn per a surhavitaj de faŝista kadavro.

Ĉar li tre bone konas la kutim de la malamikaro, li ofte faras aŭ cajn interniĝojn. Unu tagon, li alpr simiĝis je faŝista tranĉeo k renko sian antikvan kapitanon, kiun salutis per etendita brako, laŭ faŝi maniero. Antaŭ ol la kapitano for sian miron, ĉar li supozis lin mortin li pafmortigis la kapitanon k fork rigis kelkajn soldatojn, kiuj ako panis lin. Tiu bravulo rifuzas persi konigi sian nomon de popola her

AL PORTUGALAJ KAMARADOJ

# FRATA SALUT

Ni jam delonge ŝuldas al vi, karaj kar radoj en Portugalio, publikan esprimon danko k admiro. Ni scias, sub kiaj ma voraj kondiĉoj disvolviĝas nun via aga Spite ĉion, vi laboras senhalte k ferv Akurate ni ricevas de vi saluton k mora subtenon pere de komunaj amikoj, sind plenumantaj servojn de solidaro.

Iam estonte, ni povos helpi vin fra viajn katenojn. Intertempe ni laŭte diras vi per frata voĉo: Havu fidon! Esperu!

# Hispanoj de la universala Hispanio

Kiam oni konsideras senpasie la forton—la fizikan forton—de niaj malamikoj, ĉiujn surprizas la potenco de tiuj modestaj fusiloj de Hispanio, kiuj haltigis jam, en multaj frontoj, la barbaran marŝon de faŝismo internacia.

Sed kiam oni pensas ankaŭ pri ĉiuj, kiuj staras apud ni; pri ĉiuj, kiuj nin helpas per siaj moneroj, per sia sango aŭ simple nur—eĉ tre dankinde—per sia emocio; tiam oni plene komprenas, ke nia obstino devas esti rigida por tuja rekonkero, ĝis lasta angulo, de nia lando: simbola patrio universala de la antifaŝismo.

La kazerna literaturo de la hokokruca propagando fajfas pri la fremda helpo al la «ruĝuloj». En tiu aspekto, ili ne tute mensogas. Jes! ni ricevas eksterlandan helpon. Ni kalkulas pri milionoj k milionoj da bonaj amikoj ĉie de la mondo. Jen valora k ĝentila solidaro, kiu ne ĉiam povas fariĝi konkrete videbla en la zigzagaj fluoj de nia epopeo. Tamen ĝi ekzistas en Anglio k Francio, en multaj ceteraj nacioj de la maljuna Eŭropo; eĉ en Germanio, nobla lando forpelita el la civilizo, k en Italio, unua viktimo k unua bastiono de la despotismo kun oficiala stampo. En Sovetio, freŝa federacio k en Portugalio, kadukiĝinta ekspluatejo. En Azio k en Ameriko, en Aŭstralio k en Nova Zelando. Ĉie, ajne de la mondo, loĝas homoj kun revoj k songoj por nia triumfo. Krioj aŭ sopiroj harmonie akordas. Manifestacioj, kunvenoj, postuloj en vervo k volo tre flamaj... Standardoj k afiŝoj ricevas nun la ornamon de sorĉa substantivo: Hispanio!

Kiam eksplodis la ribelo, en la sama semajno, devis okazi en Barcelono la Internacia Popola Olimpiado, kun amasa partopreno de eksterlandaj sportuloj. Multaj el ili jam havis okazon tie plaĉe ekzercadi en la utila sporto albatali la faŝismon, kiam atake ĝi pretigis siajn faŭkojn. Unu monaton poste, jam venis la unuaj eksternaciaj volontuloj. Ili venis sen armiloj, kun entuziasmo, baraktante tra baroj; ili forlasis ĉion: la varmon de familio k la relativajn komfortojn de pli normala medio. Ili estis homoj el ĉiuj landoj, el ĉiuj tendencoj, kun unu sola gvida celo: detrui la danĝeron pri faŝismo tie mem, kie tiu ebla ŝanco prezentiĝis. Laŭ tiel simpla formulo fondiĝis la internaciaj brigadoj!

Ni—ili diris emocie—estas la aktiva reprezento de la tutmonda Popola Fronto; ni venis batali por la universala paco per la venko de Hispanio. Kiuj do estas pli veraj hispanoj? Ĉu homoj de aliaj landoj, luktante en niaj tranĉeoj por savi la ĝuon de niaj infanoj aŭ tiuj enlandaj perfiduloj, kiuj vendaĉis minojn k arbarojn de sia propra lando al la tragikaj friponoj de sennacia kapitalismo? Kiuj estas fratoj? ĉu tiuj venantaj, kun heroeca fervoro, aŭ tiuj indiĝenaj militistoj pretaj esti pulĉineloj de fremdaj torturistoj? Ĉu tiuj, kiuj mortas por la libero k progreso aŭ tiuj, kiuj vivas por velkigi ĉiujn noblajn kondiĉojn de la homo?

Ni volas laŭtigi voĉon de konvinko. Ni estas hispanoj batalantaj por nia propra lando, kiu gajnis prestiĝon por universala hejmo. Apud ni batalas kuraĝe internaciaj volontuloj en specialaj brigadoj. Ili ne jam estas fremduloj; ili elverŝas sangon por ni ĉiuj, por ke la kamparanoj k laboristoj ne estu sklavoj, por ke iliaj idoj estu kleraj k feliĉaj; por ekzili la eblon pri salajro «nacia» de tri aŭ kvar pesetoj. Ili ne jam estas fremduloj, ili estas hispanoj de la universala Hispanio!

## LA PATRO KAJ LA FILO

La patro estas Niceto Alcala Zamora eksprezidanto de nia Respubliko; la filo estas Jose Alcala Castillo, nuntempa leŭtenanto de 2ª Brigado de 11ª Divizio. La patro forkuris antaŭ la ekribelo. La filo venis al sia lando, malgraŭ la patra admono, por defendi la popolon kontraŭ la faŝismo. Publikan leteron li sendis al sia patro k el ĝi ni tradukas kelkajn frazojn. Ili montras altan moralan kvaliton.

«Kiam, antaŭ kelkaj monatoj, mi forlasis nian hejmon por eniri en lojala armeo, mi meritis, viaflanke, malaprobon per kiu vi, publike, en internacia gazetaro, kondamnis mian konduton.

Mia konscienco, kun pligrandiĝinta forto diras al mi ke mi agis dece. Mia devo estis defendi legitiman registaron kontraŭ atako de perfiduloj. Pli granda estis ankoraŭ mia devo helpi popolon, kiu defendis sian vivon k rajton pri libero, kontraŭ sklaviga atako de dekduoj da aristokratoj, bankieroj k malnoblaj generaloj.

Sed nun estas plia fakto: la fremda invado! Hispanio estas invadita de Germanio k Italio. Hispanio defendas sian sendependecon. Tiu vero trafis ĉiujn angulojn de la mondo; ĝin mi povis konstati kun tuta krudeco.

Luktante kontraŭ germanoj apud Jarama k italoj en Guadalajara mi tion konstatis k bontis, koleris k indigniĝis pro tio ke tiuj, kiuj malfermis la vojon al fremda armeo, sin nomas «naciistoj»

Tie mi ne trovis eĉ unu soldaton hispanan. Estas la vera milito por sendependo, la urboj okupataj de regula fremda armeo, la enloĝantoj kaŝitaj en keloj, milita sovaĝa rabado, civiluloj mitralitaj... unuvorte: la tragika teroro de atako al Abisenio, kiun ni tiom da fojoj komentis k kondamnis; tia estis la spektaklo kiun mi propraokule vidis.

Mi luktas kun la suferanta popolo, por eviti nian sklavigon, por ke nia lando ne estu dispeciĝita, por ke Hispanio estu libera lando, ne kolonio. Mi luktas apud ĉi tiuj anonimaj herooj, soldatoj de Popola Armeo, kiuj elirante el tranĉeoj, plenaj je koto, malgraŭ frosto k pluvo, rekonkeris por Hispanio centojn da kvadrataj kilometroj.

Mi estas feliĉa ĉar mi luktas en vicoj de Popola Armeo; tia mi estas ĉar mi plenumas mian devon, kiel hispano. Ĉiu, kiu forlasis Hispanion, kiu helpas rekte aŭ nerekte la invadintojn, maksimume kiam oni okupis altan postenon, kiel Prezidanto de la Respubliko, ne rajtas sin nomi hispano.

Nun mi estas pli certa ol ĉiam, pri la venko de hispana popolo, kio ne nur estos la venko de Hispanio, sed ankaŭ la venko de universala demokratio.»

## REDAKCIA RIMARKO

**Kiel plurfoje dirite, nia gazeto tute ne dependas de iu ajn aparta politika aŭ sindikata organizo. POPOLA FRONTO, honesta al sia titolo, estas la internacia informilo de la tuta hispana popolo en lukto kontraŭ la faŝismo. Fidelaj al tiu normo nia starpunkto estas lojala akcepto de la legitima Registaro, kiel sola oficiala organo gvidanta la epopeon. Ni bedaŭras se, pro partia fanatikemo aŭ pro naiva senkoloreco, kelkaj—malmultaj—legantoj ne bone ankoraŭ komprenis niajn sincerajn k nudajn celojn. Nia sola ĝojo, en la tragedio, estas la konvinko, en mirinda fakto, ke ni donis medolon al Esperanto k sukcese tremigis samtakte la histojn el koro de multaj k multegaj esperantistoj el ĉiuj landoj k tendencoj kies aprobon ni havas okazon tre ofte konstati. Kun firma obstino do, per la ĝentila subteno de granda parto de la verda popolo, dum sektemuloj fanatike grumblas, ni iru entuziasme la vojon celitan...**

# AMARAJ PRIPENSOJ

Ni, kiel aktoroj en la konvulsianta tragedio de Hispanio, eble ne plene konscias pri ĝia vastega amplekso. Mankas la promontoro, kiun per jaroj ellevas la Historio, por rigardi trafe, laŭ ĝustaj dimensioj, la grandegan signifon de nia epopeo. La batalantoj, zorgante nur pri la epizodoj, kiujn ili mem partoprenas, ne povas mezuri la panoramon de sia propra luktejo.

Tamen, eĉ kun tiaj mankoj, oni povas taksi bone la fundon de la terura veto, kiu okazas dum ĉi tiuj drastaj horoj. Temas ja pri ege kruela kolizio inter du sistemoj, inter du principoj. En tiu kruda kverelo, la mezaj terminoj ricevas premegon ĉe kuntuŝo de la du blokoj. Tial deliras ĉiuj parolantoj pri amikaj solvoj. Ne ekzistas tia eblo! La fino estos nepre absoluta venko de unu flanko, kun plena malvenko de la alia. Kunvivado jam venos post la submetiĝo; zorgi je tio pli frue, estas egale ol plilongigi la militon senfine, ĝis detruiĝo k elĉerpiĝo de Hispanio; reguloj pri kunestado, eblaj antaŭ la ribelo, ne estas oportunaj nun, sen konkreta masonado de ies venko.

La rezultato de nia lukto influos jam efike en la eŭropa politiko k eble eĉ en tiu de la tuta mondo. Tion flaris tre akute la despotaj ŝtatoj; jen do la kialo pri la cinika helpo, kiun Germanio, Italio k Portugalio liveras al la ribeluloj. Ili scias, ke siaj absurdaj reĝimoj stabiliĝos aŭ suferos skuon, laŭ venko aŭ fiasko de la perfiduloj. Tiu konvinko, plus la intenco kapti valorajn poziciojn por estonta ĝenerala milito, pelas ilin subteni sen vualoj, la atakon kontraŭ la Respubliko. Dume, la ŝtatoj kun demokrata—aŭ pseŭdodemokrata—strukturo, anstataŭ elekti partion por la leĝo, kiun reprezentas la legitima registaro, uzas artifikon, kiu malrekte signifas helpon, tre efikan, por la faŝismo. La tiel nomata Ne-Interveno taŭgas por nodi, je manoj k piedoj, la registaron malebligante al ĝi akiri aĉete armilojn k municiojn kun stagno de la normala rajto.

Stulteco inspiris tiun taktikon per kiu oni faris k dikigis ĉiujn danĝerojn, kiujn naive pretendis eviti kelkaj nacioj. Ili volis malkreskigi la militon k tamen ĝi plilongiĝis apoteoze; ili aspiris estingi flamojn, kies fajreroj povus bruligi la eŭropajn pulvejojn, k la sekvo estis la apero de impona vulkano. Finfine, ili deziris, ke Hispanio ne estu nesto de iu socia nova sistemo—minaco por la kapitalistaj normoj de Okcidento—k ili akuŝis, dank' al deviga streĉo de la popola penado, la plej favorajn ŝancojn por tio, kion ili tiel zorge avidis eviti. Por la privata ordo de ĉiu el la du nacioj, kreantaj tiun strangan ludon, la danĝeraj simptomoj estas multe pli gravaj. Kun italoj en Maljorko, por Francio estas la vojo tranĉita inter la metropolo k ĝiaj afrikaj kolonioj, krom tikla averto en la okcidentaj Pirineoj k en la baska marbordo, kie situas sen hezito, kun potenca milita materialo, la germanoj gvidantaj la premon kontraŭ Bilbao. Anglio post la perdo de ekvilibro en la Mediteraneo povas riski la detruon de sia privilegio en la pordo de Gibraltaro.

Nu, ĉi tion certe povis eviti Anglio k Francio, per tre simpla k korekta maniero, ebligante al normala hispana registaro aĉeti ĉion necesan. Se ni mem, per niaj propraj rimedoj, estus povintaj akiri, en la unua momento, aviadilojn, artilerion k fusilojn, la faŝista ribelo dronus antaŭ ol kalkuli tri monatojn. Ne nur oni rifuzis fari al ni tiun servon sed ankaŭ oni devigis la ceterajn landojn fari la samon. Tiel la milito ŝvelis danĝere!

En la internacia ludo, kiun mi komentas, ekzistas, por la hispanaj socialistoj, la dolorega punkto ke tiun ludon gvidas, eĉ kiel iniciatintoj, reliefaj figuroj de la Socialismo; personoj, kiuj postenas en la registejoj kiel oficialaj delegitoj de laboristaj partioj. Ĉiuj genioj de la elokvento, kune, ne estus kapablaj klarigi kontentige la paradokson, ke dum la partioj, per sincera esprimo, montras al ni sian simpation, tiuj, je kies nomo, kiel reprezentantoj, ne de altaj personaj kondiĉoj sed nur de organizita proleta forto, okupas seĝojn de ministroj, donas al ni trakton, kiun nur ni povas atendi de natura malamiko. Tion mi jam diris foje: La socialistaj partioj per unu mano —tiu de sia amaso—salutas nin, premante ĝentile la nian; per la alia—tiu de sia gvidantaro—ili premas nian gorĝon kun intenco strangoli nin, sen atento al detalo, ke la hispana popolo batalas nun ankaŭ por la tutmonda proletaro.

Indalecio PRIETO

**Socialista Ministro pri Maro k Aero de la hispana Registaro**




La apaĉo internacia kun sia dorlotantino

## DEPUTITO PAROLAS...

Dum marta monato vizitis nian landon ĉeĥoslovaka delegitaro sub la gvido de deputito Frantisek Nemec. La delegitaro tute libere vizitis la frontojn k la urbojn. La gvidanta deputito diris, al ĵurnalisto de «Vecerink Prava Lidu», jenon:

«Kelkafoje la delegitaro travivis la teruron de la bombardadoj. Ni ĉiuj estas pretaj aserti la bestecon de la faŝismo, kiu detruas hispanan landon. Kortuŝis nin la ruinoj de unu el la plej belaj kvartaloj de Madrido, la stratoj kie amasiĝas rubaĵoj, konstruaĵoj detruitaj, senkulpaj estuloj masakritaj senutile. La faŝistoj senkompate bombardas, laŭ ordonoj de ribelintaj generaloj.

En militistaj rondoj, ne jam nur hispanaj sed fremdlandaj, la batalo de Brihuega estas konsiderata kiel la unua milita malvenko de Mussolini en Eŭropo. Ankaŭ politikuloj difinas ĝin kiel gravan politikan faktoron.

Nun, kiam oni rapide organizas la popolan armeon k oni kreas la necesajn oficirojn, oni rajtas esperi pluajn gravajn venkojn.

La delegitaro ĉie estis akceptita per evidentaj k sinceraj pruvoj de simpatio. En Hispanio oni respektas k amas Ĉeĥoslovakion. La eminentuloj, kiujn ni vizitis, bone konas la situacion k problemojn de nia lando.

Faŝistaj imperialismoj, germana k itala, havas en sia vojo du barojn, kiujn ili intencas nuligi: en Okcidento, la respublika Hispanio, k en Oriento la demokrata Ĉeĥoslovakio. Se la faŝismo estos venkata en Hispanio, Ĉeĥoslovakio ŝuldos al hispana popolo siajn sekurecon k pacon.

En Hispanio ne ekzistas komunista reĝimo, kiel intencas kredigi la faŝistoj. Koalicia Registaro konsistanta el ĉiuj klasoj k politikaj partioj regas la nacion. Reale ĝi estas amplesa demokrata koalicio. Ankaŭ la leĝoj neniel havas strangan karakteron.

Forte mi opinias, ke Madrido estas nevenkebla. Ties fortikaĵoj estas bone konstruitaj k defendataj per mirinda heroeco. La urbo, situanta en la fronto vivas normale; la kinejoj funkcias, kafejoj estas plenplenaj, la tramoj cirkulas. Nur memorigas kun doloro pri la milito la materiaj perdoj, kiujn suferas la urbo.

Sed se la demokratio sin savas, kiel mi firme kredas, tiam Madrido vekiĝos al nova k mirinda vivo, kiel ekzemplo patosa.

# Vortoj de Thomas Mann

**En Svisio aperis broŝuro pri hispana tragedio. Por tiu ilustrita broŝuro verkis epilogon la fama aŭtoro, literatura Nobel-premio, Thomas Mann. Ni ĝin konigas diligente al niaj legantoj.**

«Daŭras la interveno en Hispanio, k tiel cinike, kiel malofte povis vidi la mondo. Efektive tio, kio okazas tie, de antaŭ kelkaj monatoj, estas la plej skandala hontiga spektaklo, kiun iam registris la Historio. Ĉu la mondo vidas tion? Nur parte, ĉar la murdanta intervenismo mirinde konas la manieron idiotigi la mondon k ĝin blindigi ĝis neebligo por rigardo de realaj okazoj.

Oni komunikis al mi la sekvantan pripenson de iu sinjorino: «Kiu povus pensi ke en Hispanio, la ruĝuloj neatendite plenumus tiom da kruelaĵoj? La ruĝuloj! Kaj neatendite!» Estas vero ke tiu sinjorino loĝas en la parto de Eŭropo, kie oni pleje zorgas eviti diskonigadon de la vero, tio estas, en Germanio. Per ĉi tiu broŝuro, kies teksto estas kreita de verkistoj, kiuj ne estas precize «sovaĝaj bolŝevikoj» sed viroj kristanaj kun burĝaj konceptoj, oni povas konstati ĝis kia grado la reformema programo de hispana Popola Fronto, politika alianco de respublikanoj k socialistoj, estas malmulte revolucia; k kia estis la antaŭa situacio, kiu devigis la starigon de tiu Popola Fronto k okazigis ĝian legitiman k decidan triumfon dum ĝenerala balotado.

Sed, ĉu oni ne havas koron? Ĉu oni ne havas inteligentecon? Ĉu oni devas lasi forpreni, sen rezistado, ĉion, kio restas el libera, homa juĝkapablo, de la privilegio ĉiam kunigita al plej malsuperaj instinktoj de tiuj, kiuj sin ŝirmas per la vortoj Civilizo, Dio, Ordo k Patrio?

Subpremata popolo, ekspluatata laŭ plej kaduka formo, malfruiĝinta popolo, celas al pli neta k digna ekzistado, al sociordo dank' al kiu ĝi povus atingi—laŭ civiliza vidpunkto—lokon pli bonan ol tiu, kiun ĝi okupis ĝis nun.

Por tiu popolo la libero k progreso ne estas ankoraŭ konceptoj elradikitaj fare de la ironia k filozofia skeptikismo; ili reprezentas la plej altajn k plej ŝatatajn valorojn el la vivo, la nepraj kondiĉoj de nacia honoro.

Tiu popolo donis al si mem registaron, kiu komencis, kun la prudento trudata de la specialaj momentaj cirkonstancoj, la taskon solvi la plej gravajn problemojn k efektivigi la plej urĝajn plibonigojn. Kio okazis tuj? Ŝprucis k fiaskis ribelo de generaloj je la servo de la malnovaj ekspluatantaj k subpremantaj fortoj, kombinitaj kun fremdaj manovroj; kiam la ribelo estis preskaŭ sufokita, ĝin revigligis la fremdaj registaroj malamantaj la liberon, kiuj pro ricevitaj promesoj pri ekonomiaj k strategiaj avantaĝoj, efektivigendaj post la venko de la ribelintoj, ĝin nutras k subtenas per mono, soldatoj k militmaterialo. Tiamaniere la sanga disverŝado, kiu okazigas senrimedajn kruelaĵojn, fariĝas senfina.

Kontraŭ popolo, kiu streĉe luktas por siaj liberoj k homaj rajtoj, estas ĵetitaj la trupoj de siaj propraj koloniaj teritorioj. La fremdaj bombardaj aeroplanoj detruas urbojn, renversas la vivon, murdas virinojn k infanojn.

Se la kapitalista eŭropa gazetaro povus decidi per si mem, la hispana ĉefurbo estus falinta de antaŭ multe da tempo k la venko de la «ordo» k «tradicio» super la «marksista kanajlaro» estus plene atingita.

Sed malgraŭ tio ke la urbo estas grandparte detruita, Madrido, firme rezistas k la «ruĝuloj», kiel faŝistaj gazetoj nomas hispanan popolon, defendas sian vivon kun heroeco, kiu devus pripensigi la plej brutigitan vasalon pri la moralaj fortoj, kiuj impulsas la popolan movadon.

Nuntempe la «rajto de l' popoloj pri memdispono» ĝuas en la tuta mondo la plej grandan oficialan respekton. La diktatoraj k aŭtokrataj ŝtatoj estas devigataj siavice, elteni la ŝajnigon ke ili reprezentas la volon de 90 ĝis 98 po cento el siaj popolamasoj.

Tamen, evidentiĝis ke la ribelintaj militistoj ne estas apogataj de hispana popolo k eĉ ili ne povas tion kredigi; ili celas atingi tian eblon pere de la marokanoj k de la invadaj trupoj.

Eĉ supozante, ke nunmomente oni ne povus ekzakte precizigi kia estas la deziro de hispana popolo, estas absolute pruvite, laŭ klara k senduba maniero, kion ĝi ne volas: Ĝi ne volas generalon Frankon!

Tamen, la eŭropaj registaroj, kiuj deziras ke la libero estu sufokita, agnoskis la ribelan registaron en momento kiam la milito atingis sian kulminon.

Tiuj registaroj, kiuj en siaj respektivaj landoj montras certan sentemon pri kazoj de alta perfido, helpas viron, kiu liveras sian landon al fremduloj; ili, kiuj sin nomas «naciistoj» klopodas atingi alvenon en la gvidon de unu el siaj kunkulpuloj, por kiu neniel gravas la sendependo de sia lando, se la libero k homaj rajtoj povas resti nuligitaj; k kiu deklaras preferinda la morton de du trionoj el hispana popolo, ol la triumfo de la «marksismo» aŭ, kio samvaloras, la triumfo de iu sociordo pli bona, pli justa k pli humana.

Vere tio estas tro indigniga, krima k malaminda!



Dum milito la dimanĉoj ne estas festo. Jen vigla aspekto de dimanĉa mateno en nia redaktejo prilaborante la ekspedon de lasteaperinta numero de POPOLA FRONTO

**Esperanto, per nia prudenta agitado, vekas eduke sian popolon**

# LUPIDO

Vittorio Mussolini, la filo de l' *Duce* estis sendata al Abisenio por bombardadi la etiopiajn vilaĝojn k li, laŭmode, verkis libron kun alloga titolo. Kiam oni legas tiun verkon, oni dezirus forgesi la nomon de l' aŭtoro, sed estas tre malfacile; ĝi naŭzas tiom...

La libro estas tipa frukto de faŝista lupido. La junaj faŝistoj estas pli cinikaj ol siaj patroj k eĉ pli senkonsciaj ol la malnovaj faŝistoj. Li sin amuzas per aera bombardado sur lando, kiu nur havis kelkajn fusilojn por sindefendo.

Ni kopias kelkajn frazojn:

«Mi ĵetas du bombojn; poste du aliajn. Kiam mi ne trafas la celon aperas disreviĝo. Nur mi atingas malgrandajn rezultojn! Ĉi tie la etaj kabanoj, konstruitaj el trunkoj k argiloj, ne kontentigas min.» (paĝo 28).



Kruela faŝista generalo Mola, kiu uzas en Baskio la frenezajn taktikojn de la degenerinta ido de sia «nacia» mastro

«La bruligaj bomboj plaĉas pli al mi ĉar almenaŭ dank' al ili oni vidas fajron k fumon. Ni zorge bruligis ĉi tiun regionon, sed tie bedaŭrinde jam loĝis neniu.»

«Alvenis ordono, ke aviadilo de la 14ª grupo bombardadu la zonon de Adi-Aba, nur per bruligaj bomboj.»

«Adi-Aba estas regiono apuda al Eritreo k eble oni pensis, ke neniu kolono povos utiligi tiun vojon. Por atingi pli bonan videblon, oni devas bruligi la montojn, la platajôojn k la vilaĝojn...»

«Estas laboro amuza, kun tragika efekto, sed bela.»

«Kiam mi atingis taŭgan altecon, metode mi ĵetis la bombojn; kiam ili alvenis teren kaŭzis blankan fumon k la sekaj herboj ekbrulis. Tiam mi pensis pri la bestoj; imagu kiamaniere ili fuĝis!»

«La sekvintan tagon ni ripetis la saman taskon. Ni ŝarĝis bruligajn bombojn k fine ni malsupreniris super la grandaj abisenaj domoj ĵetante, per la manoj, bombojn je du kilogramoj.»

«Estis tio amuza. Mi ne trafis la tegmenton de domo ĉirkaŭata de arboj. Sed post tri atakoj mi ĝin trafis. La indiĝenoj, kiuj estis interne, ekvidantaj bruli la tegmenton, freneze fuĝis.»

«Tiuj du tagoj, la tuta distrikto estis grandega fajraĵo. La fajro hela malrapide marŝis, sed senhalte.» (paĝoj 77-78).

«Enfermitaj per fajra cirklo KVIN MIL homoj havis malĝojan finon! Tio estis infero. La flamoj atingis nekredeblan altecon. Ili ruĝigis la sunsubiron» (paĝo 92).

«Ni faligis sur Dakue, kie koncentriĝis granda amaso en la placo, kelkajn bombojn...» (paĝo 45).

Tiuj fragmentoj bone elpruvas la psikologion de la aŭtoro, faŝista junulo, kiu emas danci, kartludi... k sin amuzi per tiaj bombardadoj.

Ĉe la fino de la libro, li speciale mencias, ke li fieras pri sia barbo «kiu estas konata en la Imperio». La barbo estas la plej grava rezulto el tiu heroa kampanjo.

Kiam li revenis en Italion oni premiis lin per «Medalo por Milita Merito». Lakto de lupino estis efika!

NEDERLANDA KUNLABORO

# LA POLIPO

Unu el la sekvoj de la Mondmilito estis, ke en unu granda ŝtato—Sovetio—la katolika eklezio, kiu estis la plej potenca religia organizo estis preskaŭ tute nuligata. Vane ĝi klopodis renovigi la tie perditan potencon.

Sed ne sukcesinte en tiu momento, la katolika eklezio, kun sia ruza Jezuitaro, decidis atendi pli favoran momenton k intertempe energie pligrandigi sian influon en la vivo de tiuj popoloj, kie ĝia influo ne ankoraŭ estis serioze subfosita.

Kiam Mussolini kaptis en Italio la povon, la Eklezio komprenis la favoran okazon gajni tiun kontraŭbatalanton de la religio, kiel kunhelpanton al siaj planoj. Post mallonga periodo, kreskis, el kunfandiĝo de la antaŭaj malamikoj, la hodiaŭa monstro, kiu allogas unuflanke per la vizaĝo de la savonta Jezuo Kristo, k aliflanke montras la fizionomiajn trajtojn de la senskrupula despoto Mussolini. Post tio sekvis, sub la gvidado de Dolfuso, la plej perfida atenco sur demokratojn, liberpensuloj, k laboristaj organizoj, por tiel repuŝi la popolamasojn en mezepokajn vivkondiĉojn. La vasalo de la Jezuitaro bone plenumis sian taskon, ekstermante sennombrajn senkulpajn viktimojn.

La sekvinta numero de la Papista-Mussolina programo estis la aventuro de la konkero de Abisenio. En tiu dramo la polipa karaktero, por la unua fojo, sin klare montris, ĉar la Eklezio ludis, per siaj en aliaj ŝtatoj etenditaj kaptobrakoj, decidan rolon. Per ĝia potenca influo, tiuj ŝtatoj estis retenataj interveni favore al la malfeliĉaj abisenoj; k la banditaro povis plenumi sian bestaĉan laboron sur la primitiva popolanaro de la lando, sen defendo de moderna armita armeo.

En la ĵus pasinta jaro, la rezulto de la voĉdonado en Hispanio forte minacis la nelimigitan potencon de la eklezia k militista kastoj en tiu lando. Pro tio estis decidite: tiu ŝtato estus la sekvonta viktimo de la monstro! Ekleziularo k militistaro komplotis al tio, uzante preĝejojn k monaĥejojn kiel armil- k municideponejojn k fortikaĵojn, alportante la maŭrojn el la Afrika tero por servi kiel nutraĵo de la militistaj idoloj. En Hispanio la milito ankoraŭ furiozas. Tiel unu ŝtato post la alia fariĝas viktimo de la kombinaĵo, en kiu nun ankaŭ kunlaboras kiel tria aliancano la germanaj rabistoj, laŭ la ordonoj de Hitler.

Paŝon post paŝo, la ruza Jezuitaro certe alproksimiĝas al sia celo. Ĝi kontinuas sin ĵeti sur siaj malfeliĉaj viktimoj unu post la alia, retenante la ĉirkaŭantajn landojn por sia influo per «ne enmiksiĝo», dum ĝiaj aviadiloj k friponaj bandoj alportas la ĉielan paradizon sur elektitan parton de la terglobo, al gloro de Dio. Tiamaniere frakasas la monstro ŝtaton post ŝtato, inter siaj polipaj kaptobrakoj.

Post Hispanio sekvus Francio, Belgio, Nederlando, Ĉeĥoslovakio, k. t. p.

Escepte se... ankoraŭ Eŭropo, ĉiuj liberaj homoj, en lasta favora momento vekiĝas, malsukcesigas la intencon, k disŝiras la kaptobrakojn de la monstro, tiel ke ĝi mortu kun putranta korpo, sed... tempo urĝas!

ARIADNO

# LA OKAZAĴOJ EN KATALUNIO

Ĉiu konscias, ke nia malamiko estas lerta krom abomena. La agentoj de Hitler en Barcelono, manovrante ruze en vastaj medioj, scipovis estigi, en la kataluna ĉefurbo k en kelkaj aliaj lokoj de la aŭtonoma regiono, la flamojn de stranga ribelaĉo, kiun la oficialaj popolaj instancoj, kun la komprenemo de la respondecaj organizoj, sukcesis rapide sufoki inter aplaŭdoj de la tuta opinio antifaŝista. La hispana registaro, pli forta nun ol ĉiam, tuj post restarigo de la popola ordo, laŭtigis noton, kiun ni tradukas sen plia komento:

«Larĝe informita jam pri la okazintaĵoj en Katalunio, la Registaro unuanime decidis:

Esprimi sian plej firman kondamnon al ili, ĉar nur malamikoj de la Respubliko, celantaj malfaciligi la popolan venkon povas ribeli per armiloj kontraŭ la legitimaj institucioj.

Por eviti la ripeton de similaj bedaŭrindaĵoj, oni faras severan enketon pri deveno k sekvoj de tiuj faktoj. La punindaj epizodoj, tie ĵus okazintaj ricevos rigore la pezon de la leĝo.»

## NIA MUNICIO

| | | |
|---|---|---|
| Valencia esperantistaro | 57 | ptoj. |
| Berl.—Albacete | 28 | » |
| R. A.—Callosa | 5 | » |
| A. G.—Tabernes | 2'50 | » |
| G. W. R.—Sheffield | 25 | » |
| M. T.—Alcubierre | 10 | » |
| Welton.—Coventry. | 5 | ŝil. |
| Pamphilon.—Londono (?) | 1'6 | » |
| G. R.—Malarhojden | 10 | svkr. |
| E. E.—Stokholmo | 5 | » |
| F. L. E.—Sekcio 5 Rotterdam | 1'80 | gd. |
| J. A. V.—Maasluis | 1'50 | » |
| M. W.—Utrecht | 0'50 | » |
| G. S.—Arnhem | 10 | » |
| J. K.—Zaandijk | 0'75 | » |
| F. L. E.—Sekcio 2 Rotterdam | 4 | » |
| F. L. E.—Sekcio Wormerveer | 1'35 | » |
| G. v. P. k aliaj.—Rotterdam | 0'29 | » |
| F. L. E.—Sekcio Beets | 5 | » |
| D. M. M.—Amsterdam. | 0'25 | » |
| G. v. d. H.—Amsterdam | 0'25 | » |
| F. L. E.—Sekcio Krimpen | 1'50 | » |
| J. B.—Zutfen | 1 | » |
| B. J.—Freistal | 18'80 | ffr. |
| York-anoj | 9'6 | ŝil. |
| F. E. T.—anoj.—Toulouse | 95 | ffr. |
| M. M.—Montfalgoux | 10 | » |
| M. V. Deenze. | 10 | » |
| J. V.—Praha | 50 | » |
| A. V.—Olvuone | 52'63 | » |
| S. K.—Bratislava | 15 | » |
| W. K.—Surrey | 54'25 | » |
| R. H.—Lille | 10 | » |
| Sodertalje Esperantistoj | 135 | » |
| E. L.—Breintree. | 3 | dol. |
| C. S.—Buenos Aires | 200 | ffr. |
| G. B. H.—Dunfeankne. | 50 | » |
| F. L. W.—Los Angeles | 42'11 | » |
| M. H.—London | 2'6 | ŝil. |
| Birminghama filio de SAT en Britio | 20'60 | ffr. |
| Groupe Esp. Ouvrier.—Or-L. J.—Marseille | 5'59 | » |
| R. D.—Marseille. | 5 | » |
| R. D.—Vours. | 10 | » |
| V. R. G.—París | 10 | » |
| R. A.—Lens | 40 | » |
| Socialdemokrata Gimnastika Grupo Laborista D. F. S. —Plzen. | 71'97 | » |
| G. N.—Holmsund | 16'85 | » |
| E. C. H.—Cardif | 4'50 | » |
| Esp. Lab. Grupo.—Gablonz (4ª donaco) | 45 | ĉkr. |
| T. Q. B.—Lourdes | 10 | ffr. |
| Arbeidernes Esperanto forbund.—Oslo | 105'25 | kr. |
| Ĉekoslov. Lab. Asocio Esp-ista | 31'26 | ffr. |
| R. B.—Castellón | 25 | ptoj. |
| Richter.—Jarama-Fronto | 10 | « |
| S. D.—Korboba-Fronto | 25 | « |
| H. M.—(vizitinto) | 350 | » |

La lastaj ciferoj ne estas eraro sed ĝentila persona donaco de vundita germana esperantisto batalinta en la Internacia Brigado.

## Koran dankon!

Ni esprimas al ĉiuj gazetoj, esperantistaj aŭ ne, kiuj represis parton de la enhavo de POPOLA FRONTO en diversaj landoj k tre speciale ni dankas la kamaradojn, kiuj sindone klopodas al tiu celo. Pro manko de spaco ni ne kutimas publikigi la nomojn de tiuj amikoj nek la titolojn de la koncernaj tre multaj jurnaloj. Pro sama kaŭzo ni ne malfermis rubrikon por la kvitanco de gazetoj, kiujn ni regule ricevas interŝanĝe, kun aŭ sen represo de materialo el POPOLA FRONTO. Dankon popolfrontan al ĉiuj!

## LASTA HORO

La spektakla ofensivo faŝista en la Nordo estas nun bravege haltigata. Dank'al evakuado de virinoj k infanoj el Bilbao, la kuraĝaj baskoj povas pli senembarase defendi la liberon.

La angla k franca popoloj kortuŝe konkurencas en tiu humana k solidara servo. Madrido ankoraŭ estas Madrido! nia premo estas granda ĉirkaŭ Toledo k en multaj gravaj lokoj de Andaluzio. En Katalunio, post la bedaŭrindaj kvereloj, la ordo estas absoluta. La internacia opinio bezonis dek monatojn por kompreni ke la pravo estas nia; kvankam iomete malfrue, tio estas decida por la venko, kiu jam alproksimiĝas...

Kontrolinta ŝipo angla «Hunter 15», sur akvoj proksimaj al Almerio, ĵus ricevis pafojn de torpedo kies devenon ankoraŭ oni ne scias. Tiu faŝista rekta atako al Anglio povas esti grava!

**OKAZE** de la 1ª de Majo, ni ricevis el ĉiuj landoj, precipe el Sovetio, multajn salutojn, kiuj havigis al ni altajn emociojn. Pro neeblo respondi al ĉiuj private, ni esprimas publike nian fervoron al tioma kvanto da amikoj

## POPOLFRONTA LETERUJO

P. V.—Plzen.—Bedaŭrinde, neniu el niaj gek-doj havas tempon nun por korespondadi. La plej multaj batalas en la frontoj k tiuj, kiuj ankoraŭ restas ĉi tie estas treege superŝutataj de laboro.

P. Z. H.—Svendborg.—Ni kordankas pro viaj bondeziroj k kiel vi, ni esperas ankaŭ baldaŭan venkon super la faŝistaj banditoj. Ne sendu ĉekon. Preferinde estas, ke vi sendu tion per poŝtmandato al nia ĝenerala Peranto en Francio. Antaŭdankon!

E. L. O.—Ealing.—Siatempe ni ricevis viajn diverslingvajn lernolibrojn, kiujn ni jam sendis al niaj k-doj de la Internacia Brigado. Pri enkonduko de esp.-lernado en fabrikoj de Barcelono, ni ne estas bone informataj ankoraŭ. Momente ni scias nur, ke niaj katalunaj samideanoj preparas en komuno gravan esperantan laboron.

B.—Annecy.—Dankon pro la monsendo, kiun ni kvitancis jam en la pasinta numero. Ni ĝojas, ĉar vi trovas nian gazeton interesa k korekte redaktita. Tio pruvas la facilecon de Esperanto, ĉar, kiel ni kelkfoje skribis, ni estas profesiuloj nek de la lingvo nek de la ĵurnalismo. Krome, vi jam scias, ke la entuziasmo iome helpas ĉiam.

K. O. P. E. K.—Saigon.—Via flama kontraŭfaŝista saluto el malproksima Indoĉinio tre multe ĝojigis nin, ĉar ĝi montras, kiel vi trafe skribis, ke por la Idealo ne ekzistas distanco.

C. S. N.—Herning k al multaj aliaj.—Ni sendos al vi la gazeton, sed adresojn de korespondemuloj ni ne jam havas. Anoncojn en P. F. ni ne akceptas.

V. U. G.-Puebla Valverde.-Ni ne konas la adreson de tiu revuo. Neniam ni aŭdis pri ĝi.

F. D.—Albacete.—Vian monsendon ni kvitancis sur la 11ª nº, al via indikita adreso ni jam sendis tion, kion vi deziris.

R. G. O.—Milwankee.—Kun granda intereso ni legis vian leteron k ni volas gratuli vin pro via aktiva laboro favore al nia batalo. Ankaŭ ni gratulas ĉar vi estas la unua pagata esp.-instruisto de la Usona registaro. Dankon pro la monsendo!

V. G.—Rostov Don.—Dankon pro viaj senditaj afiŝoj, kiuj jam ornamas nian grupejon. Espereble vi ankaŭ ricevis tiujn, kiujn ni sendis al vi. ĵus ni ricevis ankaŭ pakaĵon kun librojn, dankon!

H. A.—Dref.—Ni kvitancas la bonan ricevon de viaj senditaj germanlingvaj libretoj, kiujn ni tuj transsendis al la internacia Brigado.

S. S.—Montreal.—Via letero bone alvenis. Dankon pro viaj bondeziroj. Ni certe sendos la gazeton.

J. B.—Londono.—Ni ĝojas ĉar P. F. plaĉas al vi tiel multe. Pri ĝia postmilita pludaŭrigo ni nenion decidis ankoraŭ. Unue ni triumfu! Poste...

Paca Rondo.—Alger.—Dankon pro viaj pacaj bondeziroj. Kvankam multaj ne kredos tion, estu certaj ke ni batalas por la paco.

F. K.—Zagreb.—Laŭ via deziro ni kvitancas kun danko la bonan ricevon de viaj ses senditaj resp. kup.

A. R.—Zeist.—Postuloj de spaco devigis nin mallongigi vian artikolon, sen ia kripligo por ĝia senco. Vi certe scios pardoni!